



Unum ovile et unus pastor.  
Unu ŝafejo kaj unu paŝtanta.  
(JOH., X, 16.)

# ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

---

**Parolado de Lia Kardinala Moŝto la Papa Delegito de la Eŭkaristia Kongreso ĉe la malferma kunsido en la panteono, en Musta, Malto.**

*„Dominus Jesus in qua nocte tradebatur accepit panem et gratias fregit et dixit: Accipite et comedite; hoc est corpus meum” (Corinth., II, 23-24).*

Viaj Moŝtaj Eminenĉoj, viaj Moŝtaj Ekscelencoj,  
Viaj Moŝtaj Episkopoj, Sinjoroj, Sinjorinoj,

Kie ni povus trovi vortojn pli konvenajn, pli simplajn, pli esprimindajn por malfermi nian Eŭkaristian Kongreson? Ili estas la vortoj de Paŭlo, la granda apostolo de la gentoj, kiu rakontas la Institucion de la altega kaj dolĉa Sakramento, kiun ni ĝisvenas ĉi tie por glori; de Paŭlo, kies amflamata koro enfandiĝis en la koron mem de Jezuo, laŭ la bela esprimo de S-a Krisostomo: *„cor Pauli, cor Jesu”*; de Paŭlo kiu predikis la evangelian doktrinon sur ĉi tiu benita insulo, kaj kiu estis la unua, kiu oferis la adorindan viktimon de nia saveco.

Estis efektive, ĉirkaŭ la jaro 55-a de nia epoko, laŭ la kronologioj plej probablaj, kiam la ŝipo, sur kiu vojaĝis Paŭlo kaj lia kunulo S-a Luko, disbatita dum 14 tagoj de terura ventego, certe per volo de la Dia Providenco, pereis kontraŭ la rifaro de ĉi tiu insulo, ne perdinte tamen la

vivon eĉ unu el la vojaĝantoj: „*Et cum evasissemus, tum cognovimus quia Melita insula vocabatur*” (*Acta Ap. I, 25*).

Li trovis viajn praavojn ankoraŭ idolanoj, sed gastamaj, ĝentilaj kaj servemaj; ecoj ĉi tiuj propraj al via gento, kaj kiujn Dio rekompensis per la ne-komparebla donaco de la Fido — ĉi-tie li restis tri monatojn predikante, kuracante la malsanulojn, fondante belan kristanan komunecon, kies unua Episkopo, laŭ la tradicio, estis Publio, la Princo de la insulo.

Sed Paŭlo, kiu estis apelaciinta, kun la fiereco de roma urbano, al tribunalo de Cesaro, forveturis Romon por atesti respekton al Petro, kaj kun li kundividi la egan honoron sigelante per sia sangelverŝado la instruadon de Jezuo, por poste posedi kune kun li per ĉiuj jarcentoj la premion en la eterna urbo.

Kaj hodiaŭ ĝi estas efektive la posteulo de Petro: nia sankta kaj amata Papo Pio X-a, kiu, malebligita enveni persone, sendas al vi unu el Siaj Delegitoj, komisiita prezidi en Lia respektega nomo, la solenan Eŭkaristian Kongreson okazanta en ĉi tiu insulo, kie Paŭlo ĵetis, unua, la frukto-donan semon de via katolika kredo, kaj de via kulto al la Tre Sankta Eŭkaristio.

Romo kaj Malto, hodiaŭ reciproke sin manpremas; Romo, la patrino de ĉiuj katolikaj eklezioj, Malto ŝia filino amegata, ambaŭ kunigitaj per respekto kaj dankeco kun la apostolo de la gentoj; ambaŭ indaj ricevi la neestimeblan profiton de la Fido de la unua komenco de l' kristianismo.

Nek la Delegito de l' Papo estas por vi fremdulo, nek fremduloj estas vi por li. Ho, jes; mi rememoras ankoraŭ la grandiozajn festojn, antaŭ sep jaroj, en la feliĉa cirkons-tanco de la kroniĝo de la Senmakula Virgulino en la urbo Kospikuo (Cospicua); mi sentas ankoraŭ en mia koro la dolĉan emocion tien eniĝintan per la kortuŝanta akcepto, kiun al mi faris la religia, civila kaj milita aŭtoritatoj. Kune kun la karaj loĝantoj de ĉi tiu insulo — kaj nune tiuj ĝojoj kaj dankemocioj ree vekigās, sed pli fortaj pro la egaj elmontroj de simpatio, afekcio kaj respekto al la Papa Delegito — admirante la vojojn de ĉi tiu insulo tiel

bone ornamitaj, la bonajn kaj elokventajn motojn, la belegajn triumfajn arkaĵojn, la sinceran kaj serenajn ĝojojn sur ĉiuj vizaĵoj, mi bone komprenis vian pensadon: solene honoriginte Marion, vi ĉiuj kunigitaj en unu sola sento de pieco kaj fido deziris ankaŭ fari ion plu por Ŝia Dia Filo. Mi ankaŭ perfekte komprenis, ke estis Mario, nia Respektinda Reĝino, kiun vi preĝas kaj honoras tiel brulame, kiu tie ĉi preparis la vojon por Jezuo, efike direktinte al ni viajn pensojn kaj vian koron: „*Ad Jesum per Mariam*”.

Ho, estu benitaj, vi loĝantoj de Malto, kaj vi karaj pilgrimantoj el ĉiuj nacioj ĉi tie alvenintaj por atesti honoron, ne sole personan kaj privitan, sed kolektivan, publikan, solenan, kiel taŭgas al Kreinto de l' Universo, al Reĝo de la reĝoj, al Elaĉetinto de la homaro, kiu pro senfina amo volis resti por ĉiam kun ni „*non relinquam vos orphanos*”, nutri vin per Sia senmakula karno, vivigi nin per Sia dia vivo. Estas tiu ĉi, inter ĉiuj, mistero, profunda kaj nekomprenebla, sed kies realiĝo estas garantio la vorto klara, formala, kotagoria de unu Dio, antaŭ Lia morto. „*Hoc est corpus meum*”, ĝi estas mistero de nemezurebla alteco „*mysterium fidei*”, en kiu estas enhavataj kaj kvazaŭ disŝutitaj ĉiuj riĉecoj de l' Dia amo „*in quo divitias sui amoris quasi effudit*”, laŭ la frazo de la konsiliĝo de Trento (Sekc. XII, ĉ. IIa). Sed tiu ĉi mistero ne estas kontraŭ la saĝo, kiu, spite la blindigo de ĝia brilo, malaltiĝas kaj adoras, dum la koro, kiu sojfas la senlimecon, sentas ĝian mistikan flamon, la ĉastajn dolĉecojn, la nepriskribeblajn mirindaĵojn.

Ĝi estas pro tio ke la Eŭkaristio estis ĉiam konsiderata laŭ la Evangelio kaj la tradicio, kiel la centro de la kristana vivo, la suno de la inteligenteco, la trezoro kaj la animo de l' Eklezio. La Patroj, la Doktoroj, la orientaj kaj okcidentaj Liturgioj, la konsiliĝoj sincere prikantegas la laŭdojn de ĉi tiu tre dolĉa Sakramento, al kiu, kiel fokuso, konvergas la tuta kulto de l' Eklezio, kaj sen kiu ĉio estus malvarma, malbela senvive. Efektive estas ĉi tiu pano de l' anĝeloj, kiun ni ĉiuj manĝas, kiu nin kunigas, nin fratigas, kaj kiu nutras nian piecon, laŭ la bela kon-

siderado de S. Aŭgustino, kiu ekkriadis kun sankta entuziasmo: „Ho Sacramento de pieco, ho signo de unueco, ho kunligilo de bonfarado”. Dio, li ankaŭ diris, en sia senlima potenco ne povis fari ion pli granda, en sia senlima saĝeco ne povis elpensi ilon pli taŭgan por nia bono — en sia senlima boneco ne povis prezenti al ni donacon pli belegan kaj pli altprezan.

Sinjoroj! ĉi tiu doctrino estas tiu sama, kiun predikis S. Paŭlo al viaj praavoj; estas tiu sama, kiun konfesis la unuaj kristanoj, kiuj adoradis, amis, kaj ricevis, kiel ni, la tre Sanktan Eŭkaristion — kaj se dum la jarcentoj de persekutado la Eŭkaristia kulto estis kovrita per la vualo de l' mistero kun celo eviti, ke ĝi estu profanata de la idoloj, tamen la fideluloj neniam ĉesis varmigi sian koron ĉe tiu dia fajro, konservante la Sanktajn Sajnaĵojn kiel trezoron de la trezoroj, en ilia domo, sur iliaj brustoj, kaj ofte la antaŭan tagon de la martiro ili pasigis la lastan nokton adorante la tre Sanktan Oferadon, kun kiu, post la elverŝado de ilia sango, ili iris unuigi supren en la ĉielo.

Alvenis la jarcentoj de paco kaj libereco, kaj la katolika eklezio ne malpliigis la kulton al la Sankta Eŭkaristio, kontraŭe ŝi defendis ĝin kontraŭ ĉiuj eraroj, konstruigis por ĝia honoro templojn kaj altarojn, inspiris kaj altigis per ĝi la artojn kaj la literaturon, disvastigis en la societojn la posedon de la boneco kaj konveneco de la moroj, kaj, super ĉio plifortigis la kuraĝon ĉe ŝiaj filoj en la penado, en la malfacilaĵoj de la vivo, impresante en ilian animon la energion de la ofero kaj de la heroeco por ĉio malfacila, nobla, grandanima.

Demandu, kiel faris la historiisto Taine, al la misiisto, kiu, ankoraŭ juna, farlasas patrolandon, familion, esperojn por disvastigi la evangelion inter la sovaĝuloj, kiuj eble preparas al li la morton; demandu al la monaĥinoj de la Bonfarado, starantaj ĉe la litoj de la malsanuloj kaj de la agoniantoj, en la malgajaj ĉambregoj de la malsanulejoj, aŭ meze de danĝeroj sur la kampo de batalo; demandu al tiuj ĉielaj kreitaĵoj, kiuj pasigas siajn tagojn helpante la maljunulojn, la gangrenulojn, la leprulojn, la pestulojn —

demandu, mi diras, al ili kie ili atingas la kuraĝon por venki la naŭzon de la naturo, kaj, ĉiuj, sen ia antaŭa konsiliĝo, montros al vi la sakramentujon kaj la sanktan Eŭkaristion; ĉiuj el ili respondos, ke kiam Jezuo malsupreniras en ilian bruston, donacante al ili tute Sin mem, ili sentas la necesecon oferi sin mem al siaj fratoj, al la malriĉuloj, al la malsanuloj, al la malhelpuloj en ĉia kondiĉo.

Krom tio, mi ne daŭrigas citi la glorojn kaj la egajn bonfaradojn de l' Eukaristio; tio estas la tasko de eminentaj oratoroj, kiujn vi baldaŭ havos la plezuron aŭskulti en niaj kunsidoj — mi sole rimarkigos al vi, por via kaj mia konsolo, jenan fakton, kiun oni povas observi ĉi tiun epokon ĉe la granda katolika familio, tio estas, progresan kaj egan pliigadon de pieco kaj kulto al la Tre Sankta Eŭkaristio, kiu antaŭen disvastiĝas kiel refreŝiga bloveto de vivo en ĉiujn direktojn de la tero. Efektive oni ne povas nei, ke la pasinta jarcento en ĝia dua duono, kaj la komenco de l' nuna jarcento, post la forigado de la glaciaj teorioj de l' Jansenismo, estas karakterizataj per certigado pli solena kaj pli praktika de la reala ĉeestado de Jezuo en la Sakramento, kaj per konvinkado pli vasta kaj pli profunda de la neceseco ricevi ofte la Sanktan Eŭkaristion, neelĉerpebla fonto de nia forto meze de la atmosfero de pekoj, kiuj nin ĉirkaŭas.

Ŝajnas, ke tiu pliigado de pieco kaj religieco malfermigis serion da sukcesplenaj evoluoj por la Eklezio, kiel diris la Sankta Patro skribinte leteron al la Episkopo de Pavio,<sup>1)</sup> kaj feliĉan rekonsciiĝon de la erarigaj principoj kaj de la funestaj inklinoj de la jarcento. Efektive la eraro, kiu superregas la Modernan Societon kaj celas ĝin alpuŝi al aldisfaliĝo kaj barbereco, estas la naturalismo, kiu, kiel ĝin priskribis la Vatikana konsiliĝo, alcentrigas ĉiujn siajn fortojn por forigi Jezuson Kriston nian solan Savinton, el la inteligenteco, el la moroj, el la leĝoj, el la institucioj, per unu vorto el la tuta socia vivo, anstataŭigante Lin sole per la racio kaj la naturo. Kaj el tio, jen la libera penso kaj la libera moralo, la glacia egoismo, la avideco

<sup>1)</sup> Letero al la Episkopo de Pavio 12-9-12 (Acta Ap sedis N. 18).

al plezuroj kaj la eksigo de ĉiu nobla kaj sankta idealo, la malaltiĝo de la senmorta animo al la bruta materio.

Nun la Eŭkaristio forte kontraŭstaras tiun eraron kaj ĝiajn malpravajn konsekvencojn. Ĝi altigas kaj nobligas la animon, purigas la koron, inspiras nin al grandanimaj faroj; ĝi malkovras la purajn horizontojn de la supernatura regno, igas nin ami niajn fratojn, nin eltiras el la aĵoj materiaj kaj kadukaj por nin kunigi kun la ecoj spiritaj kaj eternaj.

Plena de tiuj grandaj verecoj, en lin eniĝintaj, la glora Papo Leono XIII-a unu jaro, antaŭ ol li estis entombigita, priskribadis en unu memorinda encikliko <sup>1)</sup> la nekompareblajn profitojn de l' Eŭkaristio. Li ĝin montradis kiel la solan rimedon kontraŭ la malbono de la Societo, kaj li admonadis la fidelulojn tial ke ili sin nutru ĉiam de la Pano de la Vivo.

Sed, kiu pli ol nia amegata Papo Pio Xa, kiu rimarkante la homan Societon profunde skuigitan en ĝiaj jarcentaj bazoj, la verecon malpliĝintan inter la homoj, la volon malfortiĝintan kaj jam ne kapabla kontraŭbatali la malbonon; kiu pli ol Li proklamis la Eŭkaristion medikamenton de la homaj pasioj, ĉiaman fonton de reviviĝo kaj de vivo? Disfaliginte ĉiujn barojn, kiuj igis la eniron pli malfacila, kaj rememorigante la fidelulojn pri la belaj kaj malnovaj tradicioj de l' Eklezio, li admonis la fidelulojn al la ofta kaj, plejeble, al la ĉiutaga komuniĝo; Li plie volis, ke ĉiuj kristanoj de la tagiĝo de ilia vivo kunintimiĝu kun la adorebla koro de Jezuo, fonto de pureco kaj amo.

Sinjoroj, la dudektri kongresoj, kiuj antaŭeniris la nian, efike kunhelpis ne nur por pli bone sciigi al ni la altegecon kaj belecon de l' Eŭkaristio, sed por propagandi ankaŭ la kulton kaj la piecon. Ni ĉie postlasis profundajn impresojn kaj rezultojn konsolantajn kaj daŭrigajn.

Kia estos la sukceso de nia XXIVa kongreso? Estas mia firmega konvinko kaj mi opinias ke tia estas ankaŭ la via, ke la kongreso en Malto ne malsuperos la aliajn. Certe ĝi ne havas kaj ĝi ne povus havi la karakterizaĵojn

<sup>1)</sup> Mirae charitatis 28-5-1902.

de kelkaj el la antaŭaj; sed ĝi entenas unu tute specialan ĉar multvalora.

La geografia posicio de ĉi tiu klasika insulo, kaj la antikveco de ĝia popolo, kiu rememoras la feniciajn, la grekajn, la kartagenajn, la Romajn popolojn, aldonas al nia kongresio eksklusivan, allogan, grandiozan — laŭ feliĉa esprimo, Malto estas kiel vastega kaj luksa altaro, kiu leviĝas meze de la bluaj akvoj de la mediteraneo, inter la tri vastaj kontinentoj de Europo, Afriko, kaj Azio — la ondoj plaŭdantaj kontraŭ ĝia rifaro elvenas direkte el la Sankta lando, kie Jezuo fondis la neesprimeblan misteron de la Altaro, kaj el Romo, el kie disvastiĝas la mondon la pas-traro, la ministraro de l' Eŭkaristio.

Sed tio, kio donas al nia kongreso la pli belan kaj pli specialan prerogativon, mi tion diras tute sincere, estas la ega amo al la fido en ĉiuj Maltanoj, la granda pureco de iliaj moroj, la neskuebla fideleco al la Sankta Ŝego kaj la profunda respekto al la Tre Sankta Sakramento.

Tiu neestimebla heredo elvenas de Paŭlo, kiu lasis ĉi tie la neniigeblajn postsignojn de granda kaj sankta personeco, kaj ĝi restis ĉiam integrala sur ĉi tiu insulo, spite la alternado de tiom da regadoj, speciale tiu de la Araboj dum tri jarcentoj.

Nenia homa forto estis iam kapabla venki la konstantecon kaj firmecon en la fido de la Maltanoj. Kaj kial? Tial ke la animo de la tuta popolo restis intime kunigita kun Jezuo Eŭkaristia. Efektive de la tempoj pli malproksimaj vi trovas la kongregacion de la Tre Sankta Sakramento fondita en ĉiuj paroĥoj, kiel centro de preĝpetado, de unueco kaj fortenco; en pli proksimaj jarcentoj vi rimarkos la belan praktikadon de la kvardek Horoj, tiun de la tria dimanĉo de ĉiu monato, dediĉita al la solena kulto de l' Eŭkaristio; vi trovas la gloron de la procesioj ĉe la festo de la Korpo de la Sinjoro, la specialan honoron al la Sankta *Viatiko* solene alportata, ankaŭ nokte, kiam balkonoj kaj fenestroj estas lumigitaj same kiel oni tion rimarkas dum la festoj; vi trovas fine, ke la ofta komuniĝo estis observata antaŭ ol nia respektinda Papo ĝin estus

rekomendinta al la mondo per tiaj efikaj kaj inspiritaj vortoj.

Tial min ne mirigas, se per tia fajra kaj agema fido la malta popolo elĉerpis forton kaj ne submetiĝan kuraĝon por defendi sian patrolandon kaj kun ĝi la religion kaj la civilizacion el la ripetitaj kaj terurigaj atakoj de la turka armeo kaj ĉi tie ekaperas al ni gloran epopeon militistaran kaj religian, kiu kunigas la glorojn de viaj praavoj kun tiuj de la fama ordeno, kiu ricevis sian nomon de ĉi tiu insulo, kie li postlasis monumentojn rimarkindajn kaj nedetruiblajn de ĝia ega kuraĝo, de ĝia malavareco kaj de ĝia regnestra grandeco. Sufiĉas rememorigi la teruregan atakon de la jaro 1565-a, kiam 8500 militistoj, la kvinono de la malamika armeo venke subtenis, dum kvar monatoj, sub la energia kaj saĝa direktado de la granda Majstro Johana de la Valetto, la atakon de 135 galeroj turkaj, kiuj estis devigitaj senarmigite kaj malordigite foriri Bosforon.

Unu el viaj poetoj tute prave diris, ke tiu, kiu plenigis per kuraĝo viajn militistojn en tia ega batalo, estis Dio, kies protektanta kruco brilegis sur ilia glora ŝiparo.

Tie ĉi, meze de popolo kun tiom da sanktaj tradicioj, nia kongreso ne povus esti malfermigita sub pli bonaj aŭspicioj. Ĉi tie ĉio spiras amon al Jezuo Kristo, kaj tiu amo bruligas ankaŭ la pilmigrantojn el ĉiuj nacioj alvenintajn tiel multnombre, ke ili estas devigataj peti gastamecon de la ŝipoj mem, kiuj ilin alveturigis kaj kiuj formas ĉirkaŭ la gastama insulo belan kronon de surnaĝantaj hoteloj.

Kiu estas la celo de nia solena renkontiĝo? Tion mi diras per malmultaj, sed sinceraj vortoj. Ni renkontiĝis ĉi tie kun celo glorigi nian dian Majstron en la Sakramento de Lia amo; por proklami Lian superregecon sur la mondo, sur la individuoj, sur la societoj; por atesti al Li la honorojn, kiuj al Li apartenas kiel Kreinto kaj Elaĉetinto; por Lin kompensi per niaj eblaj fortoj, je la malrespekto, kiun Li tiel ofte ricevas en la Sakramento de la Altaro; por protesti kolektive kontraŭ tiuj, kiuj celas, per bedaŭrinda frenezo, Lin forigi el la societoj, el la familoj, el la penso



kaj afekcio de la homoj; laste per pliigi, en nin la amon al nia dolĉa Jezuo, kiu estis la Unua, kiu nin tiom amis.

Kaj nun, finante mian paroladon al mi nur restas min turni al Jezuo mem kaj lin petpreĝi, kune kun vi, por ke li benu niajn laboradojn, ekbruligu niajn korojn kaj eklumigu nian spiriton, por ke nia kongreso estu utila por lia gloro, kiel ankaŭ por la honoro de la malta popolo kaj de la katolika mondo. Tiel estu!

Esperantigis D-ro GUSTAVO BUSUTTIL.

## „Lorica” de Sankta Patrico.

Mi leviĝas hodiaŭ.

La Dia Potenco min gvidanta, La Dia Forto min subtenanta, La Dia Saĝo min direktanta.

La Okulo de Dio antaŭen de mi rigardanta

La Orelo de Dio por mi aŭskultanta.

La Vorto de Dio por mi parolanta, La Mano de Dio min defendanta.

La vojo de Dio sin eletendanta antaŭ mi, La Ŝildo de Dio min protektanta, La Armeo de Dio min gardanta.

De la kaptiloj de l' diabloj, De la allogoj de l' malvirto, De la malsanktaj deziroj de mia naturo.

De ĉiu homo kiu kontraŭ mi komplotas — Estu li proksima, aŭ malproksima, sola aŭ kun aliaj.

Estu Kristo kun mi, Estu Kristo antaŭ mi,

Estu Kristo post mi, Estu Kristo en mi,

Estu Kristo sub mi, Estu Kristo super mi,

Estu Kristo ĉe mia dekstro,

Estu Kristo ĉe mia maldekstro,

Estu Kristo en la fortikaĵo, Estu Kristo en la veturilo, Estu Kristo en la ŝipo.

Estu Kristo en la koro de ĉiu homo, kiu pri mi pensas.

Estu Kristo en la buŝo de ĉiu homo, kiu al mi parolas.

Estu Kristo en ĉia okulo, kiu min vidas.

Estu Kristo en ĉia orelo, kiu min aŭdas.

Tradukis: P-ro PARKER.

„Lorica” = Brust-Ŝildo.

## Notoj pri Lourdes la lando de Mirakloj.

*Daŭrigo.*

VI.

### La Pilgrimoj.

Tuj post la Aperoj de la Senmakulino en Lourdes, venis multaj pilgrimantoj por viziti tiujn benitajn lokojn kaj preĝi la ĉiupovan Virgulinon. Sed la organizitaj naciaj pilgrimoj datas de 1873, jaro, en kiu okazis la unua, direktita de P. PICART, aŭgustenano de la Ĉieliro de la Virgulino.

Mi ne intencas skribi tie-ĉi la Historion de la Pilgrimoj, sed provas doni ideon pri la kortuŝantaj ceremonioj, kiuj okazas dum tiuj pilgrimoj.

La ĉefa ceremonio estas nediskuteble la procesio de la Sankta Sakramento, kiu okazas ĉiutage je la 4-a posttagmeze. La esplanado estas tutokupita de malsanuloj; ĉiuj maltrankvile atendas la trairon de la Sankta Sakramento. Oni vidas malfeliĉajn invalidojn, sin apogantaj sur lambastonoj, kompatindegajn kreitaĵojn, kies la membroj estas refalditaj aŭ torditaj, la okuloj malhelaj, senlumaj kaŭzante aflikton al rigardantoj. Aliaj havas la vizaĝkoloron palegan aŭ febrotremas; sur matracoj estas kuŝataj la gravaj malsanuloj preskaŭ agoniantaj. Estas ĉagrenega frataro de suferoj; la rendevuo de vundoj, de ulceroj kaj de paralizoj.

La procesio forlasas la groton. Ĝi malrapide kaj solene antaŭeniras inter grandega popolamaso formante spaliron ĉiufanke. Estas iro de la delegacioj de diversaj pilgrimoj, poste sekvas la pastroj. Jen la Sanktega Sakramento, eka-perante sub la baldakeno. Li trapasas meze de lia popolo, tiu Jezuo kompatema, kiu amas la simplulojn; kiu, malĉiĉie, en Judeo resanigis la malsanulojn. Kaj kiam Jezuo-Hostio eniras en la duoncirko, tiam aŭdiĝas la samaj krioj, kiuj resonegas en aeroj: Hosanna al la Filo de David! Glorita estu tiu, kiu venas en la nomo de la Sinjoro! Sinjoro, savu nin, ni pereas! Sinjoro, faru ke mi vidu, ke mi aŭdu, ke mi marŝu!

Kaj subite iu paralizito marŝas, iu surdulo aŭdas, iu blindulo vidas. Tiam kanto dankema preterflugas el ĉiuj brustoj: Te Deum laŭdamus!

Sur la monumenta ŝtuparo de la preĝejo de la Rosario, la Sanktega Sakramento benas la popolamason kaj eniras en la sanktejo.

La procesio kun lumingo, kiu okazas ankaŭ ĉiutage, je la 8-a vespere, estas egale kortuŝanta.

Super la kapoj, steloj brilas; ili estas nekalkuleblaj en la brunigita lazuro, kaj ankaŭ sur la tero, miloj da malgrandaj flamoj trembrilas, tiuj de vaksandeloj de la procesio kun lumingo.

Laŭlonge de la deklivoj kondukantaj al la Baziliko, la luma parado serpentiras. Ĉia flamo prezentas animon preĝantan kaj dum la manoj portas alte la fajrajn stelojn, ĉiu koro preĝegas kaj ĉiu voĉo kantas: „Ave Maria”.

Fine, la partoprenantoj de la procesio kuniĝas antaŭ la preĝejo de la Rosario kaj kantas fervore la kredon de la Sankta Katolika Eklezio.

Tiu ceremonio okazante je la vesperkrepusko multe impresas, kaj ĝi estas vere la vesperpreĝo de la pilgrimantoj.

Dum la pilgrimoj okazas ankoraŭ solenaj mesoj, ĉu ĉe la Baziliko, ĉu antaŭ la sankta groto, kaj ĉiunokte la nokta adorado de la Sanktega Sakramento en la preĝejo de la Rosario. Ĉiuj ceremonioj, eĉ la nesolenaj, estas kortuŝantaj, ĉar oni multsentas la gracon de Dio, kiu ĉirkaŭas vian animon.

Oni diris, ke Lourdes estas la ĉiela vestibulo. Tio estas vera, ĉar nenie oni sin sentas tiel bona, tiel tutplenigita per la Dia amo, tiel kristana ol en la lando de mirakloj. Iu, kiu vizitis Lourdes, revenas tute kuraĝigita, tute energiigita por la estontaj bataloj.

Tio spertos la katolikaj esperantistoj, kiuj estos tiel felikaj, ke ili ĉeestos al tiuj nekompareblaj manifestacioj nur videblaj en Lourdes.

(Fino.)

MAX ROUB.

# Oficialaj Komunikoj.

---

## V-a Internacia Kongreso-Pilgrimo de la Katolikaj Esperantistoj en Lourdes (12—17 Aŭgusto 1914)

**Sub la alta Patronado kaj Honora Prezido de  
L. E. M. Monsinjoro SCHŒPFER,  
Episkopo de Tarbes kaj Lourdes.**

---

### NOVA ALVOKO.

---

*Karaj I. K. U. E.-anoj!*

Jen la monato de majo, la monato de la floroj!

De longa tempo, la kredantaro dediĉis al la Sankta Virgulino tiun dekduonan pecon de la jaro — la plej belan, la plej freŝan, la plej poeziplenan, — por ke la kristanoj, samtempe ol ili suprenirigas al la Dipatrino siajn kantojn povu ornami per floroj la altarojn kaj bildojn de tiu, kiun la Eklezio nomas per la bibliaj esprimoj „*flos campi et lilium convallium*”, t. e. „la floro de la kampoj kaj la lilio de la valoj.”

La redaktoro de E. K. esprimis la deziron, ke la *majo* numero de nia centra organo estu pli speciale dediĉita ol la aliaj numeroj al nia V-a kongreso. <sup>1)</sup> Kun ĝojo la komitato akceptis tiun inviton, kaj petis, de diversnaciaj porbatalantoj de nia movado, ke ili aldonu sian voĉon al la nia.

La kongreso de Lourdes donos al nia katolika Esperantista movado, sian plenan signifon, montros ĝian veran vidpunkton, kaj starigos nin sur nia definitiva vojo.

En la komenco, multaj aliĝis al nia movado, nur ĉar ili vidis en ĝi pluan rimedon por fari propagandon al Espe-

<sup>1)</sup> *Noto de la Redakcio.* — Bedaŭrinde pro diversaj kaŭzoj tlu deziro ne povis efektiviĝi. Eble en Junio

ranto. Iom post iom, klariĝis la konvinko, ke, ne nur *propaganda* ligo ĝi devas esti, sed jam *utila* asocio, kvazaŭ la kerno de vasta tutmonda movado, kiu grupigos, dank' al la komuna lingvo, la *katolikan dvangardon* de ĉiu lando.

Konsciante pri ĉi tio, la I. K. U. E. anoj komprenis, ke, por sukcesi en tiu alta celo, ili devas ĉerpi, el la fonto mem, la spiritan forton, kiu estas al ili necesa. Kaj jen kial nia movado, kiu, en la komenco, estis preskaŭ pure *lingvistika*, estas nun movado *religia*. Jen kial al la katolikaj Esperantistoj *ne sufiĉas havi kongresojn*, sed ankoraŭ estas bezonataj *piaj agoj, piaj manifestacioj*.

La Kongreso okazonta apud la sankta groto de „Massabielle” estos tute plenigita, tute parfumigita de la ĉiela bonodoro de la preĝo!

Venu tien, ho vi, fratoj ĉiulandaj, kies animoj bezonas ripozi, dum kelkaj tagoj, el la ĉiutaga laboro, el la bruoj de nia materialista mondo, el la pezo de la ordinara vivo!

Venu tien, ho, vi, kiun tedas la malpiaĵoj, la blasfemoj la insultoj faritaj al Dio kaj al lia sankta Eklezio!

Venu tien, ho vi, kiuj deziras *senti* la ligilojn de spirita frateco, kiuj mistike unuigas la filojn de la sama ĉiela Patro, de la sama dolĉa ĉiela Patrino, de la sama vasta universala Eklezio!

Venu tien ankaŭ, ho vi, fratoj disigitaj, karaj kristanaj amikoj, en kies animoj resonas la Evangelia alvoko: *Estu unu ŝafejo, unu Paŝtisto!*

En Lourdes, — dum la kelkaj tagoj de nia restado, ĉiu el ni trovos la plenumon de tiuj bezonoj, la respondon al tiuj altaj aspiroj de la animo!

## PRAKTIKAJ SCIIGOJ.

**Hotelo.** La Komitato definitive konkludis la hotelan aferon. Post multaj, sufiĉe malfacilaj klopodoj, ĝi konsentis kun unu el la plej bonaj kaj vastaj hoteloj de Lourdes, sidanta ĉe la bordo de la „*gave*” (rivero) je 5 minutoj de la baziliko kaj groto de Lourdes.

La *eksterordinare malaltaj prezoj* (rilate al la epoko de

nia pilgrimo), kiujn ni fine obtenis de la dirita hotelo estas la sekvantaj :

*Kvin-taga restado, kun ĉambro kaj 3 manĝoj:*

1a Klaso A . . . . . Sm. 16 (fr. 40.—)

1a Klaso B . . . . . Sm. 15 (fr. 37.50)

2a Klaso A . . . . . Sm. 14 (fr. 35.—)

2a Klaso B . . . . . Sm. 13 (fr. 32.50)

*Unua Klaso A* signifas : unulita ĉambro por unu persono.

*Dua Klaso A* signifas : *Du* aŭ *trilita* ĉambro (por *du* aŭ *tri* personoj.)

La klasoj B signifas : uzado de la sama lito por du personoj (rebato da 1 Sm. po persono.)

Por detale klarigi la aferon, kaj eviti multajn demandojn, mi montros per ekzemplo la ĉi supran aranĝon :

Mi supozas, ke el Hago alvenas grupo da kongresanoj konsisanta el. 1e unu pastro, 2e geedzoj X . . . . kun 2 filoj, 2 filinoj kaj du amikinoj.

La pastro, deziranta esti sola en ĉambro uzos la 1-an klason A. (Sm. 16.)

La geedzoj uzos la 1-an klason B (unu lito por ambaŭ) (Sm. 15.)

La du filinoj uzos, ĉu la 2-an klason A, *se ĉiu deziras havi sian liton*, ĉu la 2-an klason B, se ili volas kune dormi samlite, kaj aranĝiĝas kun la du amikinoj por uzado de la sama ĉambro.

Ni devas rimarkigi :

1e. ke la diverseco de prezoj rilatas ne al manĝaĵoj, *kiuj estas la samaj por ĉiuj*, sed *ekskluzive al ĉambroj*.

2e. ke la nombro de disponeblaj ĉambroj estas jena : de *unu* lito : 30 ; de *du* litoj : 30. — La ceteraj enhavos tri litojn, sed ilia larĝeco estas proporcia. (Do, nenio estas timota rilate al malgrandeco de ĉambroj.)

Ĉiuj hoteloj de Lourdes estas konstruitaj antaŭ malmultaj jaroj, kaj ĝuas ĝenerale multe pli da komforteco, ol la hoteloj de *malnovaj* pilgrimurboj.)

La prezo de la pensiono estas sendota al la kasistino antaŭ la 25-a de julio, kun dezigno de la klaso elektita.

La komitato multe deziras, ke la kongresanoj konsentu

inter si, por la uzo de ĉambroj uzeblaj de pli ol unu persono.

**Floraj ludoj.** — La kataluna ligo de katolikaj Esperantistoj proponas premiojn por la traktado de tiu temo: *La Sankta Virgulino de l' Espero*, Patronino de la katolikaj Esperantistoj. Unua premio al *versaĵo*; dua premio al *prozaĵo*.

Pro la novaj proponoj faritaj, ni prokrastos ĝis la 30-an de Junio la lastan daton por sendo de la konkursoj.

Ni rememoras, ke ĉiu konkurso devas esti sendata al la redaktoro de *Espero Katolika*.

*Por la Komitato.*

CL. COLAS.

*Al la hispanaj samideanoj!*

*Saluton en Kristo!*

Okaze de la V-a Internacia Kongreso de Esperanto en Barcelono (1909) la katolikaj esperantistoj semis la grenon de Internacia Katolika Organizado, per la decido kongresigi la tutmondajn samideanojn ĉe Parizo en 1910. Tie nia lando kontribuis al la sukceso de la granda bela festo de starigo de nia I. K. U. E. pere la ĉeesto de kongresanoj, kaj la persona aliĝo kaj mona subteno de 70 aliaj samideanoj. Sed de tiam pro la tro longaj distancoj de nia lando al la kongresurboj, Hago, Budapeŝto, Romo, ne estis eble organizi karavanojn, kvankam kelkaj aliĝis, kaj persone ĉeestis: en Budapeŝto, S-ro A. SABADELL, kaj en Romo, P-ro JOZEFO PLANAS.

En ĉi tiu jaro 1914, laŭ decido de la Roma kongreso, nia V-a devas okazi en Lourdes, kaj la Organiza Komitato fiksas la daton 12-a ĝis 16-a Aŭgusto, (tuj post la X-a Kongreso en Parizo) por festi nian ĉiujaran kongreson.

Lourdes, lando de mirakloj! estas trono de nia ĉiela Patrino la Sankta Virgulino, Espero de ĉiu malsanulo! Oni diras, ke la kulto al la Sankta Virgulino, estas tiel fama kaj popola en nia lando, ke krom la multnombraj preĝejoj al ŝi dediĉitaj, ĉiu koro de hispano estas ja altaro, sur kiu

floras ĉiam la ama kulto al Sankta Mario. Fervoron al la Virgulino de Lourdes certe pruvis nia lando per la multnombraj ĉiujaraj pilgrimoj, kiujn oni organizas ĉe ni. Specialan amon montris al nia lando la Reĝino de Lourdes per la miraklaj resaniĝoj!

La lando de nia V-a kongreso estas tre proksime por ni, hispanoj, kaj ĉefe por la katalunoj! Ni devas pretiĝi por ĉeesti la Kongreson de I. K. U. E.! Per unu sola lingvo oni prezentos unuafoje al la Sankta Virgulino de Lourdes la koran preĝon, la sinceran kaj fervoran amon de la tutmondaj katolikoj. Ĝis nun tiun preĝon estis nur en la koro; en nia kongreso, ĝi floras en niaj lipoj, kaj la tutmonda himnaro kaj preĝado parfumos la Lourdes' an Katedralon! Belega spektaklo! Kiu ne volos ĝui ĝin?

Plie nia I. K. U. E. bezonas ricevi la fortojn kaj kuraĝigojn de ĉiuj nacioj. Ni devas kontribui per nia aliĝo kaj se eble ĉeesto al la sukceso de nia movado katolik-esperantista.

Kiel hispana delegito en la internacia komitato de la kongresoj, kaj en la celo faciligi al niaj hispanaj amikoj ĉiujn rimedojn por partopreni la kongreson, mi interkonsentis kun fervoja agentejo por organizi karavanon. La kosto de la vojaĝo estas:

Cerbère — Lourdes = iro kaj reveno — 1-a klaso, 58,35 fr. = 2e klaso, 42,65 fr. = 3e klaso, 29,65 fr. Kondiĉe ke la pilgrimantoj estu pli ol 25, ni ricevus 10 % da rabato. La bileton oni pagos la tagon 10-an Aŭgusto kaj daŭros 7 tagojn, dum kiuj oni povas iri aŭ reveni per ĉiuj vagonaroj ĉu grupe ĉu izole.

Barcelono — Cerbére = iro kaj reveno = 1e klaso, 48,80 ptojn. = 2e klaso, 36,90 ptojn. = 3e klaso, 23,65 ptojn. Kondiĉe ke la ekskursontoj estu pli ol 10 ni ĝuos 50 % da rabato.

Pri loĝado en Lourdes, s-ro Colás organizis servon en hotelo kiu kostos, por 5-taga ĉeesto, 35 fr. je ordinara klaso, kaj 40 fr. je unua klaso. Tamen, eble oni organizos plej malkaran servon por la hispanoj en aparta hotelo.

Ĉiu interesato bonvolu sin turni al mi (Strato Sta Ana



8, Pral, Barcelono.) Kompreneble mi nur informos al kiu sendas la aliĝmonon por la kongreskarto, t.e. 5.50 ptoj (2 Sm.)

Nestu en la koro de ĉiuj hispanaj samideanoj la entuziasmo por nia pilgrimo kongreso! Klopodu ĉiu ĉeesti la kongreson aŭ almenaŭ ĝin subtini per sia aliĝo!

*Via altestime en Kristo.*

D-ro JOAQUIM COLL.

Barcelono, Aprilon 1914-a.

## 2-a Nomaro de Aliĝantoj al Nia Kvina (ĝis la 18-a de Aprilo).

F-ino Hedwig Becker, Bromberg . . . . .	Germanujo.
D-ro Jozefo Casavonas, P-tro, Geronon . . . . .	Katalunlando.
D-ro Joaquim Coll, P-tro, Barcelono . . . . .	„
S-ro Couffinhal, Reims . . . . .	Francujo.
Rev-a P-ro Dombrowski, Kovno . . . . .	Rusujo.¶
S-ro Le Segrétain, Laval . . . . .	Francujo.
Rev-a Jozefo Lintl, Paroĥestro, Pfakofen . . . . .	Bavarujo.
S-ro G. van Oijen, Hago . . . . .	Nederlando.
Rev-a Jozefo Planas, P-tro, Barcelono . . . . .	Katalunlando.
S-ro Joan Rosals, Barcelono . . . . .	„

### Monoferoj por aĉetado de Standardo kaj Memorskribaĵo lasotaj en Lourdes:

Rev-a Preposto Becker, Bromberg, Germanujo	4 Sm.
Familio Buret, Sainville (Eure et Loir) Francujo	4 Sm.
S-ro G. van Oijen, Hago, Nederlando . . . . .	0 Sm. 400
	8 Sm. 400
Jam ricevita . . . . .	21 Sm. 200
Sume . . . . .	29 Sm. 600

### Por riparado de la tombo de Abato Peltier:

Rev-a Preposto Becker, Bromberg, Germanujo	4 Sm.
Familio Buzet, Sainville (Eure et Loir) Francujo	2 Sm.
S-ro Colas, Montmagny (Seine et Oise), „	2 Sm.
F-ino de Golleville, Montanbau, Francujo . . . . .	2 Sm.

F-ino Larroche, Paris, Francujo. . . . .	4 Sm.
S-ro Le Segrétain, Laval, Francujo . . . . .	0 Sm. 400
Sume . . . . .	<u>14 Sm. 400</u>

*La Kasistino*

M. LARROCHE.

55, rue de Vaugirard, Paris.

## AL LA AKCIULOJ DE „ESPERO KATOLIKA”.

Laŭ artikolo 17-a de niaj Statutoj la direktoroj kun la komisaroj kunvenos antaŭ la 15-a de junio. Ĉar ili deziras fiksi tiam la agendon de la ĝenerala kunveno, okazonta tiun-ci jaron laŭ-statute en Lourdes, mi petas la akciulojn, kiuj deziras fari proponojn por la ĝenerala kunveno, ilin sendi al suba adreso **antaŭ la unua de junio**. Mi atentigas la akciularon pri jena decido de art. 23:

„En la ĝenerala kunveno ne estas permesate preni decidojn pri temoj, kiuj ne estas publikigitaj en la agendo.”

*La Prezidant-Komisaro de E. K.:*

P. A. SCHENDELER,

Maria-Heide (Veghel),

Nederlando.

## Leterkesto.

Pfaköfen b. Regensburg, (*Bavorujo*),

la 17an de Marto 1914.

*Via redaktora moŝto*

eble bonvolos aranĝi en nia oficiala gazeto *Espero Katoliko* laŭtempan rubrikon, nome tiel diritan „leterkeston”, kie povas esti lokigataj mallongaj demandoj kaj respondoj, pri kiuj la unu aŭ la alia el niaj I. K. U. E. anoj kredeble interesiĝus.

Mi mem volas komenci per jenaj demandoj.

1. *Kiam aperos la de Romo aprobita Esperanto-traduko de la Malnova kaj Nova Testamento?* — Laŭ mia sciado „Nia Kvara” en Romo okupis sin ankaŭ pri tiu ĉi temo. En diversaj gazetoj la sciigo disvastiĝis, ke tiu ĉi deziregita traduko je Pasko 1914 estas eldonota. Ĉu tio estas vera? Estas necesege, ke ni ricevu kiel eble plej baldaŭ la de Romo aprobitan kaj **unuëcan** Esperanto-tekston de l’ S-ta Skribo. Ĝis nune citis aŭ pli vere tradukis la sanktan tekston la unu tiel, la alia alie: por la daŭro ne tolerebla stato!

2. Samtiel estus ankaŭ tre dezirinde, ke almenaŭ *la ĉefaj preĝoj ricevu unuëcan tekston*. Kiel malsame estas ja tradukitaj la samaj ĉefpreĝoj en la diversaj preĝlibroj! Ekzemple mi citas nur la kvar komencvortojn de la Anĝela Saluto „Ave, Maria, gratia plena”, pri kiuj mi trovas jenajn tradukaĵojn: *a.* Saluton, Mario, gracoplena; *b.* Estu salutata, Maria, gracoplena; *c.* Estu Vi salutata, Mario, plena de graco; *d.* Mi vin salutas, Maria, plena de favoro; *e.* Vi estas salutata, Mario, favorplena . . . . Sufiĉas; mi ne volas trovi pluajn esprimojn.

3. *Kio estas do pri teologia vortaro?* Pli frue en nia ĵurnalo „Espero Katolika” oni povis pli legi pri tiu ĉi afero, t. e. vortaro, ol hodiaŭ. Ĉu ne estas ĝiatempe stariĝita propra tradukokomisiono kaj definitiva labordivido proponita aŭ akceptita? Nun „estas super ĉiuj suproj ripozo”! En Germanujo la roma-katolika sekcio de la „Germana akademia Esperanto-ligo” (kies membro mi estas) ĵus provas alporti konstruĝojn por teologia vortaro, sed ankaŭ tiu ĉi laboro nur malrapidege progresas antaŭen. Ĉu ni eble devas publikigi iom post iom niajn ĉirilatajn rezultojn ankaŭ en nia „Espero Katolika”? Ĝis nune ni publikigis ilin nur en la monata gazeto „Ĉirkaŭ la mondo”, oficiala organo de la „Germana akademia Esperanto-ligo (=G.A.E.L.) kiu nur malmultajn rom.-kat. teologojn ampleksas. Hodiaŭ sufiĉe en la „leterkesteton”!

Kore salutas via samcelano.

Jozef LINTL, paroĥestro, I. K. U. E. ano.

**Respondo de la Redakcio.** — Volonte ni konsentas malfermi novan rubrikon en nia gazeto sub la titolo: „Leterkesto.“ En ĝi oni povos meti mallongajn demandojn de ĝenerala intereso. Tamen, ĉar nia gazeto estas sufiĉe malgranda, ni presigos *nur* demandojn, koncernantajn *la Esperanto-movadon inter katolikoj* mem kaj ĉion, kio estas kunligita kun la katolika Esp.-movado.

Respondante al demando 1. ni sciigas, ke en Romo oni diskutis *nur* pri eldono de la *Nova Testamento*. P-ro Mojado (U. S. A.) sciigis min, ke li komencis tradukadon. Kiam ĝi povos aperi mi nescias.

Al demando 2. mi respondas, ke unueca teksto de niaj *ĉefaj* preĝoj estas treege dezirinda. Eble en *Lourdes* oni povos pritakti la aferon?

Pri demando 3. la *teologia vortaro*. Precipe la *praktika* uzado de la religiaj kaj teologiaj terminoj en artikoloj, libroj, k.t.p. estas la plej bona rimedo por krei kaj poste posedi akuratajn vortojn kaj esprimojn. La alia maniero, uzata de la Katolika sekcio de la grava „Germana Akademia Esperanto-Ligo“ certe estas aprobinda, kvankam tradukoj de terminoj *ekster la kunteksto* povas konduki al neprecizaj radikoj kaj vortoj. Tamen tiu maniero estas nur ebla en *nacia* gazeto kaj inter samnacionoj, ĉar oni proponas nacian vorton por esti tradukata. Anstataŭ ke la Germanoj publikigu senpere siajn tradukrezultatojn en E.K. pli prefereble estas, ke ia internacia komitato kompetenta ilin antaŭe aprobu, kaj ke post tio aperu en E. K. la *finajn* rezultatojn de la esplorado de tiu *internacia* komitato, kiu fakte jam estis elektita dum „Nia Dua“ en Hago (1911), sed kiu ĝis nun neniam funkciis.

Sed ankaŭ la unue nomita maniero certe ne estas malŝatinda — eĉ male! Mi ne ankoraŭ verkis la promesitan artikolon, responde al la rimarkoj pri E. K. faritaj dum „Nia Kvara.“ Jen la respondo, pro kio gravaj artikoloj pri religio, biblio, filosofio, liturgio, teologio k. t. p. estas necesaj en nia oficiala organo; ĉar verkante ilin, oni estas devigata krei kaj uzi ekleziajn esprimojn *en la kunteksto mem*, kaj tiamaniere oni plej efike laboras al taŭga kaj

preciza teologia vortaro. Pro tio mi konsideras kiel mian redaktoran devon, presigi sufiĉe da tiaj artikoj en E. K., kvankam eble multaj legantoj — priatentante ne la *ĝeneralan*, sed nur sian propran intereson — pli ŝatus multajn rakontetojn kaj temojn simplajn kaj facile legeblajn. — Estas bedaŭrinde, ke aperis ĝis nun tro malmulte du *katolikaj* verkoj, eĉ pri speciale katolikaj fakoj; ĉar tiajn tradukojn ni bezonas ne tiom pro tio, ke ilia enhavo estas necesega en Esperanta traduko, kiel pro tio, ke per ilia enhavo estas riĉigata nia katolika terminaro kaj *praktike* ellaborata la estonta, speciale katolika vortaro.

---

## Nia blindula Kongreso.

### Alvoko.

---

Permesu, karaj legantoj, ke mi ree turnu min al vi kun arda alvoko por la blinduloj.

Vi scias, kiel grava ŝajnas al mi tiu ĉi demando ne nur el problindula vidpunkto, sed ankaŭ el nia pure esperanta.

Mia konvinko estas, ke, kiam oni konstatos la praktike grandan utilecon alportatan de internacia lingvo al la tutmonda blindularo, oni ne plu povos nei ĝian utilecon por ĉiuj ajn homoj ankaŭ.

Tiun pruvon, sur la blindula kampo, mi tre dezirus montri fakte dum nia Deka Kongreso en Parizo.

Sed ebla ĝi estos nur, se ĉiuj helpos al mi laŭ sia povo kaj forto.

Jam la franca Ministro de Internaj Aferoj bonvolis pruntedoni al ni senpage por la geblinduloj dormoĉambregojn en la *Nacia Instituto por junaj geblinduloj*.

Aliajn ĉambregojn ili havos por siaj laborkunsidoj, en kiuj ili diŝkutos ne la lingvon, ho ne! sed la praktikajn aferojn, kiuj ilin koncernas: enkonduko de Esperanto en iliajn lernejojn, blindulskribilaroj, internacia biblioteko, rabatoj por la poŝtsendado de punktrelefaj libroj, masaĝlernejoj, k. t. p.

Pri la nutrado dum la Kongreso ni zorgis, kaj ĝi ankaŭ nenion kostos al niaj blindaj sãmideanoj.

Sur la francaj fervojoj, kiel ĉiuj kongresanoj, ili havos gravan rabaton, kaj de tiu ĉi flanko ankaŭ por ili ne tro granda estos la elspezo.

Fine la Kongresa Komitato konsentas al la neriĉaj inter ili, kiel jam okazis en Cambridge, diversajn tute ŝatindajn donacojn.

Aliparte oni nun organizas en Parizo grandan komitaton de Sinjorinoj, Esperantistinoj aŭ simple blindulamikinoj, el plej altaj kiel modestaj klasoj sub espereble eminenta patronado, kies celo estos alporti iom da distraĵo, da ĝojo, da tutmonda lumo, al la geblinduloj pere de nia kara internacia lingvo. <sup>(1)</sup>

Tion nun mi petas de vi, amikoj, ke, se eble, vi starigu en via lando, en via urbo, en via grupo, samajn komitatojn, turnante vin ne nur al la koro kaj bonfaremo de l'

(1) *Protekta Komitato de Esperantistaj Blinduloj.* — 1) Okaze de l' internacia Kongreso de Esperantistaj Blinduloj, kiu havos lokon en Parizo dum Aŭgusto 1914, estas fondita Protekta Komitato de Esperantistaj Blinduloj.

2) La celo de tiu ĉi Komitato estas faciligi al la Blinduloj la lernadon de *Esperanto*, kiu havigas al ili altvaloran distraĵon, alportas al ili grandan ĝojon, plivastigante ilian horizonton ĝis la blinduloj de plej malproksimaj landoj kaj, jam nun, faras al ili grandan servon, tial ke, dank' al ĝi, ili povas per reciprokaj sciigoj kunlabori internacie por la plibonigado de ilia sorto.

3) La Komitato konsistas nur el protektantaj sinjorinoj, de kiuj oni petas antaŭ ĉio kaj precipe la moralan apogon de ilia nomo kaj de ilia simpatio.

4) La titolo de *Protektantino* kunportas kun si neniun kotizaĵon, nek ian ajn specialan devon, se ne, ke oni interesiĝu al la progreso de Esperanto en la tiel kortuŝanta mondo de la Blinduloj.

5) Tiun ĉi progreson oni konigos al la protektantaj sinjorinoj per paroladoj aŭ cirkuleroj.

*La helpa Sekretariino :*

MARIE LARROCHE

55, rue de Vaugirard (Paris).

*La Sekretario :*

TH. CART

12, rue Soufflot (Paris).

Esperantistinoj, sed al tiu de ĉiuj blindamikinoj, de ĉiuj virinoj.

Kun ilia helpo vi sukcesos sendube altiri la ĝeneralan atenton kaj ĝeneralan simpation sur niajn esperantistajn blindulojn, — plej grava profito ne nur por la blindularo, sed ankaŭ por Esperanto, — kaj vi plie trovos rimedon por sendi Parizon lertan, Esperante bone parolantan blindulon, kiun vi povos preni kun vi, kaj al kiu ĉiumaniere vi povos faciligi la veturadon. Tute necese estas, por ke utila kaj konvinka estu nia blindula kongreso, ke sufiĉe multaj, diverslandaj kaj elokventaj estu la en ĝi partoprenantoj.

Ne rifuzu, amikoj, vian kunlaboradon al la Blankbarbulo kaj pardonu lian certe ne tro oftan insistemon.

TH. CART

(12, rue Soufflot, Paris.)

P.-S. — Sciigojn donos tre volonte: por *Anglujo*, S-ro Adams, Plynlimon Terrace, Hastings; S-ro P. O. MERRICK, Elvetham, Shepperton; por *Belgujo*, Frato ISIDORE, Woluwe-Bruxelles; por *Bohemujo*, Prof. MACAN, Klarov, 131, III, Praha; por *Danujo*, prof. WULFF, Nyhavn, 34, Kopenhago; por *Germanujo*, Gesinjoroj Zapater-de-Chalmot, Neue Mästrichterstr. 15. Köln; por *Rumanujo*, S-ro Prezenti LEVI, Vatra Luminoasa, Bukarest; por *Svedujo*, S-ro H. THILANDER, 12, Majorsgatan, Stockholm.

(El *Esperanto*, 5. Marto: *Bileto de Blankbarbulo*.)

---

## Bibliografio.

---

*Joseph Serre*, La hipotezoj pri Lourdes. Nova kompreno pri la Miraklo kaj la Naturo (esperantigis Ges-roj Ranfaing-Zabilon d'Her). Tours, E. Ménard kaj kio, Prezo: Sm. 0.30.

Libreto supraĵa, senvalora. Tio ne signifas, ke en tiu ĉi libreto ne estas kelkaj paĝoj tre legindaj, kontraŭe, la un-

uaj paĝoj ĝenerale estas tre veraj kaj montras mallonge sed bone la neraciecon de la diversaj hipotezoj ĝis nun eltrovitaj por eviti, en la klarigo de la mirindegaj faktoj kiuj okazis kaj ĉiam ankoraŭ okazas en Lourdes, la vidpunkton katolikan, kiu, kiel bone diras la aŭtoro, mirinde klarigas tiujn faktojn kaj efektive plenigas ĉiujn mankojn de la nekristanaj hipotezoj.

Oni supozus, ke la aŭtoro do akceptus la „hipotezon”, pli bone la vidpunkton kristanan. Sed lia sentenco estas tute diversa: „la kristana hipotezo havas la malpravecon aŭ malutilecon montri sin kun formoj kontraŭaj al la nuntempa spiritstato, permesi ke oni ĝin konsideru kiel eksternatura, neracia kaj magia”. Li serĉas novan komprenon kaj donas tre malnovan tre malbone esprimitan.

Pri la konstataĵo de la mirakloj li ne havas malfacilaĵon. Estas evidente, li diras, ke en Lourdes mirakloj okazis. Por la nuntempa spiritstato, laŭ li formita de Renan, Rousseau k. t. p. la problemo nur konsistus en la ebleco de la mirakloj. Nur kiam oni diras, ke la mirakloj ne estas eblaj, oni povas diri *a priori*, ke neniam oni ilin konstatis. Tiun ĉi problemon la aŭtoro science solvos per sia nova kompreno de miraklo kaj de naturo.

Lia supozo tamen estas tute malvera. Jam Renan kaj Rousseau tute alie parolis. „Dieu peut-il faire des miracles?” demandis Rousseau, „C'est à dire, peut-il déroger aux lois, qu'il a établies? Cette question, sérieusement traitée serait impie, si elle n'était absurde; ce serait faire trop d'honneur à celui qui la résoudrait négativement que de le punir, il suffirait de l'enfermer”. Kaj Renan en sia „Vie de Jésus” skribis: „Nous ne disons pas, que le miracle est impossible, nous disons, il n'y a pas eu jusqu'ici de miracle constaté”.

Sed estu, ke la problemo konsistus en la ebleco de la mirakloj, tamen estas tro naiva lia solvo per la „nova kompreno pri la miraklo kaj la Naturo”. Laŭ tiu ĉi kompreno naturo ne estas nur naturo materia. La reala enhavo de la ideo malfermas al la scienco kaj al la naturo superajn horizontojn. La naturo ĉirkaŭprenas ĉion, la spiriton



kaj la materion, la estaĵojn de supre tiel, kiel la estaĵojn de malsupre, ĉiujn gradojn, kaj ĉiujn regnojn. En la miraklo li vidas la „agon sciencan. ankaŭ pli sciencan ol la nia, de superaj fortoj, supere inteligentaj, tiel same naturaj kiel ni, eĉ pli naturaj, ĉar ili estas pli proksimaj al la centro de la naturo, kiu estas Dio. Se la kristana „hipotezo” estus esprimata en tiu ĉi formulo, ĝi estos, opinias la aŭtoro, la plej laŭracia, la plej evidenta.

Sed li havas tre eraran komprenon de miraklo, kvazaŭ tiu estu la ago de Anĝeloj aŭ similaj estaĵoj. Jam la aŭtoro de la Psalmo 135 kantas per la paroloj: „Qui facit mirabilia magna solus”, ke nur Dio faras miraklojn. Tion ankaŭ en diversaj lokoj de siaj verkoj instruas S. Thomas (Komparu: Summa Contra Gentiles, cap. 102: Quod solus Deus facit mirabilia; Summa Theologica I quaest. 110, art. 4: utrum angeli boni vel mali possint facere miracula.) La ago de anĝeloj kaj aliaj estaĵoj nur estas ago instrumenta aŭ konsistas en ilia preĝo aŭ virto, kiu meritas la miraklon. Nur do se la aŭtoro ĉirkaŭprenas sub la nomo de „Naturo” ankaŭ Dion kaj ĉion, kion Dio povas fari, li povas diri, ke la miraklo ankaŭ estas launatura. Sed en tiu senco jam diris S. Thomas, ke Dio ne povas agi kontraŭ la ordo de la estaĵoj (Summa Theologica I, quaest. 105, art. 6: Si ordo rerum consideretur prout dependet a prima causa, sic contra rerum ordinem Deus facere non potest). Jam pli frue S. Augustinus skribis, ke „por ĉiuj estaĵoj estas laŭnatura ĉio, kion faras Li, de Kiu estas ĉia maniero, mezuro kaj ordo de la naturo” (Contra Faustum, lib. 26 cap. 3: Id est cuilibet naturale quod ille fecerit a quo est omnis modus, numerus et ordo naturae).

La kompreno de la aŭtoro pri naturo kaj miraklo do ne estas nova sed tre malnova, nur estas tre malbone esprimita. Tro naive la aŭtoro tamen opinias, ke la fundamento de la disputado estas nur „treega vortludo”. Pri tio ni fine citu la parolojn remarkindajn ĉiam verajn de S. Augustinus pri la antitezo en la mondo: „Faris du ŝtatojn amoj du, teran ja la amo de si-mem ĝis la malestimo de

Dio, ĉielan kontraŭe la amo al Dio ĝis la malestimo de si-mem.” (De civitate Dei XIV, 28.)

Oss (Nederlando.)

P. D-ro Titus BRANDSMA, Ord. Carm.

## Katolika Vivo Ĉiulanda.

### Io pri la antialkoholisma movado.

La 5-an de februaro venis al la Wien'a universitato la abstinenca apostolo, Patro ELPIDIUS, Köln'a franciskano. Tiu-ĉi en tuta Germanujo jam bone kaj merite konata populara parolisto estas simpla en sia monaĥa eksterajo sed neordinara per sia freŝa menso kaj fenomenaj elokventeco. Li parolas ne nur per sia forta germana lingvo, sed pli multe per esprimo de sia energia kapo, de siaj saĝaj kaj petolaj okuloj, de la cazaraj lipoj kaj plej multe per la fervoro por tiel bona kaj utileca afero.

Akceptita je la deka horo en la plej granda aŭlo de teologa fakultato li iris al la katedro bruege de ĉiuj aplaudita. La ĉambreĝo estis tute plenigita de Wien'aj kaj provincaj teologoj kaj pastroj. Lia Pastra Moŝto D-ro NIVARDO, la teologa dekanano kaj profesoro de la orientaj lingvoj, honorigis ankaŭ per sia ĉeesto la interesan parolon.

Per neserĉitaj simplaj vortoj parolis Patro ELPEDIUS. Li prezentis la bezonon de alkohola abstinenco antaŭ ĉio inter ĉiuj sacerdotoj kaj precipe inter la pastroj, ĉar ili estas la kondukantoj de homaj animoj, ĉar al ili turnas sin okuloj de ĉiuj paroĥanoj por ekpreni la bonan ekzemplon, por ekkoni la bonajn efikojn de la abstinenco, por lerni la ŝparemecon koncerne sano kaj mono. Kaj por ke oni nin religiestrojn sekvu, devas unue ni mem pliboniĝi por povi aliajn reformi. La ekzemplo estas la ĉefa, la plej grava ilo nian ideon propagandanta — la abstinenco de alkoholaj drinkaĵoj. Oni devas mem ideale kondukti, ĉar nur tiam oni povos „rekonstrui ĉion en Kristo”. Kaj la

grandaj propagandistoj de antialkoholismo atingintaj estas neaŭditan sukceson nur tial, ĉar ili en la predikata movado aktive antaŭiris. La sekvantoj troviĝos certe, se la praktika ekzemplo videbla estos, se nur oni la disvastigatan ideon ĉe la predikanto mem aplikitan vidos. Hodiaŭtempe havas ni tiom da vortoj eldiritaj kaj surskribitaj, sed ofte sen enhavo, kaj plej ofte sen valoro — ĉar sen praktika uzado, ke oni sopiras je la aktiva agemeco, je la fruktodona ago. Kaj oni scias ja, ke la plej belaj ideoj pereos, se ilin ne sekvos la praktiko, kaj kontraŭe la solvo de ĉi-tiu demando signifas la plibonigon de socialaj rilatoj kaj nian tiel animan kiel materialan bonharon „Kaj ni do, miaj altestimataj Sinjoroj! volu kaj ni partopreni en ĉi-tiu grandega monda movado, volu kaj ni praktike solvi la demandon de hodiaŭa tempo! Kaj unu de gravaj taskoj estu al ni: propagandi inter la katolikoj la kompletan abstinencan de alkoholaj drinkaĵoj, klarigi al ĉiu, ke la plejaj malsanoj, nemoraleco kaj mizero havas la ĉefan fonton en alkoholuzado! Ni estantaj pastroj volas, Dio helpante, servi kiel ekzemplo al niaj samreligianoj! Ni volas ne nur paroli sed ankaŭ agi!” — Bruega aplaŭdo.

Fine la eminenta parolinto pridiskutis diversajn demandojn eldiritajn de iuj ĉeestantoj, kaj enskribis la sin anoncintajn abstinenculojn. Kvardek sep da ĉeestantoj estis senpere kaj tuj post la parolo pretaj por sin enskribi. Jen la granda sukceso de tiu parolo! Patro ELPIDIUS mem konfesis, ke li tian nombron en Aŭstrio unuan fojon atinginta estas inter teologoj. — La parolo do ne restis senfrukta, kaj la Reverendulo povas esti kontenta per la tiel bela komenco. Li vizitis ĝis nun en Aŭstria monarĥio: Salcburg, Linc, St. Pölten, kaj li intencas en Wien paroladi ankoraŭ ĉe diversaj kunvenoj de inteligentaro kaj de laboristoj. Poste li forveturos aliajn ĉefajn urbojn de la monarĥio.

Al miaj plej belaj rememoraĵoj mi alkalkulis la 5-an de ĉitujara februaro. Mi vidis kaj aŭdis eminentan paroliston, kiu ne elserĉas scienculajn esprimojn, sed tiel diras, kiel la vortoj de lia koro diktitaj falas. Mi vidis en modesta monaĥo noblan homon kaj ekkonis lian bravan animon.

Unuvorte — mi vidis „menson sanan en korpo sana”. Kaj ju pli mi ĉion konsideras, des pli mi tiun franciskanon admiras. Ne baldaŭ mi ekvidos ree tian „apostolon de la abstinencmovado” — tiel oni nomas Patron ELPIDIUS en Germanujo — kaj mi bondeziras lin, la mizerikorda Dio helpu lin kaj permesu al li ekvidi fruktojn centoblajn de la propra sindonema laboro por bono de la homaro, por savo de kunulaj animoj.

Fra EŬGENIO.

Sta Kruco, la 6-an de februaro 1914.

---

## KONTINUA PREĜADO POR LA REUNUIĜO DE L' EKLEZIO.

---

(Grava alvoko al la Mario-kongregacianoj de l' tutmondo.)

En *Szerencs* (Hungarujo) nova Mario-kongregacio estis fondita la 14 de januaro 1914 por la virgulinoj grekito-katolikaj.

Tiu-ĉi kongregacio sub gvidado de l' sinjoro paroĥestro, M-sro Johano BÀNŬAY, kanoniko de l' eparĥio *Hajdudorog*, komencis novan agon: kontinue preĝadi por la reunuiĝo de l' skismintaj eklezioj, precipe por la reunuiĝo de l' orientanoj.

Laŭ antaŭdecidita ordo tago post tago unu el la kongregacianinoj preĝados por la dirita celo. La preĝoj definitaj estas la jenaj: 1 Patro Nia, 1 Saluton Mario, 1 Kredo (nikeo-konstantinapola teksto) kaj la preĝeto:

„Benata kaj plej glorata Kristo, Dio nia, fortigu la ortodoksan katolikan kredon en eterno de l' eternoj!”

Alian tagon alia kongregacianino preĝas same, matene kaj vespere.

Post la preĝoj al la S. Dipatrino kaj al nia patronino B. Margareto ni daŭrigas la kongregacian kunvenpreĝadon ĉiusemajne jene: <sup>1)</sup>

*Prefektino:* Por la paco de l' tutmondo, por la bonfarto

---

<sup>1)</sup> La preĝoj estas faritaj el la tekstoj de l' diservoj en greka rito.

de l' s. dia Eklezio, kaj por la unuiĝo de ĉiuj al Sinjoro ni preĝu!

*Ĉiuj*: Sinjoro kompagegu!

*Pref*: Plejglorinda Vi estas Kristo, nia Dio, kiu, kiel lumigilojn sur la tero, ordonis niajn Patrojn;

*Ĉiuj* (daŭrigante): kaj per ili la pravan kredon Vi instruadas al ĉiuj; ho Multkompatulo, gloron al Vi!

*Pref.*: Al Sinjoro ni preĝu!

*Ĉiuj*: Sinjoro kompagegu!

*Prezidanto*: Sinjoro, nia Dio, kies potenco estas sensimila, kaj gloro nekomprenbla, kies kompagego ne estas mezurebla nek homamo elparolebla, rigardu nin kaj Vian s. Eklezion, kaj donu al ni la petitaĵojn por nia feliĉego. Al Vi ni preĝegas, memoru Sinjoro pri Via sankta, katolika kaj apostola Eklezio, etendiĝanta sin de fino ĝis fino de l' universo, kaj pacdonu al ĝi, kiun Vi starigis per karega Sango de Via Kristo. Memoru Sinjoro pri ĉiuj episkopoj de l' ortodoksuloj, pravpredikantaj la Vorton de Via vero. Ĉesigu Vi la skizmon de l' eklezioj, moderu, per forto de Via s. Spirito, la malpacadojn de l' paganoj, de l' hereziuloj la atakojn retenu Vi, ĉiujn nin enkonduku Vi en Vian landon, kaj faru nin filojn de l' lumo kaj filojn de l' tago. Vian pacon kaj Vian amon donacu Vi al ni, Sinjoro nia Dio, Vi ja donas al ni ĉion.<sup>1)</sup>

Savu Vi, protektu Vi kaj regadu Vi Vian Eklezion kaj ties estron la Roman papon; konsentigu al la Roma Papo la episkopojn, al la Episkopoj la sacerdotojn, -al la sacerdotoj la fidelulojn, por ke ĉiuj ni formu unikan spiritan konstruaĵon konstruitan sur la fundo de l' Apostoloj, sur la ŝtonego de Petro, sur la ĉefŝtono de Kristo. Ĉian skizmon, herezion, skandalon, persekuton, kaj indiferentecon forigu Vi el Via s. Eklezio.

Permesu Vi rekomendi al Vi ĉiujn homojn (\*) kaj donu al ni, ke unube kaj unukore ni gloru Vin, Patron, Filon kaj S. Spiriton, nun kaj porĉiam en eterno de l' eternoj.

1) Ĝis tiu-ĉi vorto la preĝo estas ĉerpita el la greka Meso de S. Basilio. La postaj vortoj el la preĝo al plej Sankta Koro de Jezuo escepte la finon (\*) kiu denove el la Meso estas.

*Ĉiuj:* Amen!

*Pref.:* Estanta benata kaj plejglorinda ĉiam, Kristo, nia Dio . . . .

*Ĉiuj:* . . . . firmigu la ortodoksan katolikan kredon en eternon de l' eternoj.

*Pref.:* Plejsankta Dĥnaskintino!

*Ĉiuj:* Feliĉegu nin!

*Prezidanto:* Nin kun ŝia pia Naskito.

*Ĉiuj:* Benu la Virga Mario.

(Poste ni daŭrigas la kunvenan diservon laŭ la Gvidlibro.)

Pastroj, kiuj gvidas Mario-kongregaciojn uzu tiun-ĉi (aŭ alian :) manieron de l' porunuiĝa preĝado. La suprecitita parto de oficaĵo estas verkita laŭ greka rito. Oni povas uzi tiun senŝanĝe aŭ ŝanĝite laŭ latinaj kutimoj. Ne la vortoj estas la gravaj, sed la faro mem. Per kiu ajn vortoj, laŭ kiu ajn rito, nur preĝadu.

*La citita preĝadmaniero estas aprobita de la grekrito-katolika episkopo de l' novfondita hungara epĥrĥio **Hajdudorog:** M-sro lia ep. Moŝto Stefano Miklòsy, la 10-an de Februaro 1914, nro 541.*

Nepastroj rekomendu ĝin al pastroj, aŭ proponu persone en la kunvenoj de l' Mario-kongregacioj.

Pri la sukcesoj de l' iniciaĵo bonvolu doni sciigon al la „Mario-kongregacio de l' gr. kat. Virgulinoj”, Szerencs (Hungarujo.)

„Nos cum prole pia benedicat Virgo Maria!”

JOHANO KOZMA.

## TRA LA MONDO.

**Romo.** — **La Papo kaj la antialkoholismo.** Post Pasko la Papo donis apartan aŭdiencon por la reprezentantoj de ĉiuj abstinencaj kaj moderemaj unuiĝoj de l' tutmondo. La S. Patro i. a. laŭdis, benis kaj bondeziris la laborojn de ĉiuj antialkoholistaj unuiĝoj, kaj diris, ke inter ĉiuj socialaj laboroj neniu estas pli urĝa. Li deziras, ke la pastraro donu ĉie sian apogon kaj ke ĝi per sia instruado kaj ekzemplo sin metu mezu de la batalo kontraŭ tiu malbono.

**Ameriko.** — *La unua indian-devena pastro en Usono.* Dum la lastaj semajnoj pastrigis la unua indiano en Usono. La feliĉa pioniro nomiĝas P. Filipino GORDON, kaj estas 27 jara. La teologian kurson li absolvis en Innsbruck kaj St. Paŭl. La pastran ordenon li ricevis el manoj de episkopo KOUDELKA en la katedralo de *Superior*. (Wisc.)

**Nova apostola prefektejo.** — La Congregatio de Propaganda Fide starigis novan apostolan prefektejon en la Filipinaj insuloj. La nova lumturo de vero estas bazita sur la senlaca laborado de l' Dominikanoj. La unua prefekto estas P. Bertrandus COTHONAY O.S.D.

**Balkano.** — **Konkordato inter Serbujo kaj la S. Roma Seĝo.** Seriozaj gazetoj asertas, ke la serba registaro pretfaris projekton pri la organizo de la katolikaro en Serbujo. Laŭ la projekto Serbujo estos unu eklezia provinco kun ĉefepiskopo en *Belgrad*, kaj kun episkopoj en *Prizrend* kaj *Istip*. La ŝalajron de l' pastroj pagos la ŝtata kaso. La organiza projekto vidigas al ni, ke la konkordato inter Romo kaj Serbujo baldaŭ efektiviĝos.

**Francujo.** — **La XXV-a Eŭĥaristia kongreso.** SCHÖPFER, episkopo de Lourdes sciigis al la episkoparo de la tutmondo, ke la XXV-a Eŭĥaristia kongreso okazos en *Lourdes* de 22—26 julio.

**Hungarujo.** — **Dinamitatako kontraŭ grekito-katolika episkopo.** Ne longe antaŭe lia papa Moŝto, per bulo „Christi fideles Graeci” starigis novan eparĥion en Hungarujo por la grekитokatolikoj hungarlingvaj, por ke ili ne estu rutenigitaj aŭ rumanigitaj per la eklezia lingvo. Tiu nova eparĥio malplaĉis al la fanatikemaj rumanoj, kaj ili akre kontraŭbatalis ĝin, sed vane. Fine la 23 de februaro iu fanatika kaŝita ligo rumana faris dinamitatakon kontraŭ la episkopo de la nomita Hajdudoroga eparĥio (loĝanta en Debrecen) M-sro MIKLOSZY. Feliĉe la episkopo restis sana. La poŝte sendita bombardo *ekrazita* mortigis la vikarion ĝeneralan de l' episkopo M-sron IACZKOVICS, la sekretarion de l' episkopo, P-ron SLEPKOVSKY kaj la eparĥian advokaton D-ron CSATTH. La eparĥia arĥivisto P. KRISKO suferis gravajn vundojn kaj kuŝas en malsanulflegejo, kiel grave malsana. Tuthungarlande oni tutkore kompatas la aferon kaj faras monkolekton por starigi tomban monumenton al la martiroj.

**Italujo.** — **Rekonvertiĝinta eksjezuito.** Ĝeorgo BARTOLDI S. J., kiu antaŭ kelkaj jaroj fariĝis protestanto, revenis al la vera ŝafaro. Pli granda estos la ĝojo pri unu reveninto, ol pri mil da neniam foririntoj.

\* \* \*

**Pardonpeto de P. Kozma.** — La bedaŭrinda eksplodo en Debrecen, pri kiu estas raportita sub Hungarujo, alportis ŝanĝon en la situacio de P. KOZMA, kiu kolektas la raportojn por ĉi-tiu rubriko. La episkopo nomis lin eparĥia arĥivisto, kaj de post la 2 de marto li loĝas en *Debreczen*. La rekonstruo laŭebla de la eparĥia arĥivo okupis lin treege dum la lastaj semajnoj, tial estas tiu-ĉi rubriko tiel tre malriĉa. Venontokaze li klopodos raporti pri ĉiu nominda afero, tiu-ĉi-okaze li petas pardonon de nia legantaro. Lia verko „Romo kaj la orienta Eklezio” pro la transloĝiĝo aperos nur en julio. Antaŭmendojn oni sendu al la jena nova adreso: P. Joh. KOZMA, **Debreczen** (Hungarujo). Miklós utka 51.

---

## Sciigo de la provizora Administracio.

---

Malgraŭ la artikolo de la Prezidanto en la Aprila numero de E. K., malgraŭ la avizo por pagi la abonmonon, englutita en multegaj E. K. numeroj (Martaj kaj Aprilaj **173** abonantoj ne ankoraŭ pagis sian abonmonon por 1914 je la 29a de Aprilo. — Laŭ propono de la direktoro redaktoro, la provizora administracio nun publikigas la nomojn de la abonantoj ne-pagintaj kaj sciigas ke **nur post ricevo de la abonmono** la sekvontaj E. K. numeroj estas sendotaj al tiuj abonantoj. Sur la paĝoj 5 kaj 6 de la kovrilo troviĝas ĉiuj nomoj de la abonantoj ne-pagintaj; kiuj ĉiuj kune ŝuldas  $\pm$  **400** guldenojn al E. K. — Ĉiu persono el ĉi tiu listo ricevis avizon, ĉu en la Marta, ĉu en la Aprila numero, sed sendis nenian respondon. —

Tre povas esti ke la provizora administracio eraris, tion ĝi volonte konsentas kaj eĉ por tio petas la pardonon de la personoj je kiuj ĝi eraris; sed ĝi ne komprenas kial oni ne atentigis ĝin pri ĝia eraro, kiel faris kelkaj abonantoj, al kiuj la provizora administracio publike prezentas sian afablan dankon.

N. B. Personoj kiuj estos ankoraŭ pagintaj inter la 29a de Aprilo kaj la 4-a de Majo retrovos siajn nomojn en la listo de la abonantoj pagintaj sur la paĝo 2-a de la kovrilo.